LSG FORUMO nr-o 146 (1/2012)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj



# BONVENON AL 2012

Bonvenon al nova numero de FORUMO. Ni bonŝancas havi tiom buntan bultenon. Mi devas danki la redakcian skipon (kaj speciale Wolfgang) pro ilia bonega laboro. Mi ankaŭ dankas al tiuj, kiuj verkis artikolojn aŭ sendis komentojn al mi (ĉiujn pozitivajn) pri la bulteno kaj LSG ĝenerale. Espereble ni havos pli da inaj kontribuantoj estontece. Mi menciis enketon lastnumere, sed ne liveris ĝin al la redakcio sufiĉe frue por tiu numero, do ĝi aperas ĉi -numere. Mi esperas, ke ĉiuj membroj (kaj eĉ nemembroj) respondos al ĝi Ni volas havi organizon, kiu plenumas la bezonojn de ĝiaj membroj. Mi ne povos ĉeesti la UK en Hanojo, sed verŝajne iuj LSG-anoj estos tie. Memoru nian kongresan servon, se vi planas iri. Esperëble mi vidos multajn el vi en Rejkjaviko en 2013. Se vi volas kontakti min, e-poŝtu al randy.dean@pobox.com aŭ sendu leteron al la redakcio.

*Randy*

# LSG DUM UK EN KOPENHAGO

Inter multaj budoj je la interkona vespero, sabate la 23-an de julio, la LSG-budo disdonis gejan mapon pri Kopenhago 2011 – 2012 al LSG-anoj kaj eble ankaŭ al aliaj interestoj.

Pri la ĝenerala kunveno jam raportis Arnold en la lasta eldono de FORUMO kaj en la kongresa kuriero *Vikinga Voĉo*. (Cetere: la du vikingoj sur la frontpaĝo de *Vikinga Voĉo* estis desegnitaj de Helen Claesson).



*LSG-anoj krozas tra la kanaloj de Kopenhago* *(fotis Sven)*

Pri la aranĝo la 25-an de julio en LGBT-Danmark, Nygade 7, Kopenhago, jam raportis Bert en FORUMO. Entute ĉeestis 34 LSG-anoj. (La redakcio tamen pretervidis etan eraron: la aranĝo ne okazis la 1-an de aŭgusto, sed jam la 25-an de julio). Mi bedaŭrinde ne kalkulis kiom da landoj estis reprezentitaj. Sur la bildo en FORUMO oni vidas Emil Jelstrup, Sven Friis Jørgensen (mi), Vivi Jelstrup kaj Helen Claesson.

Kune kun Wolfgang, (kiu nun loĝas en Kopenhago) mi aranĝis la ekskursan tagon por LSG-anoj. Je la 10-a horo kelkaj el ni ŝipveturis en la haveno kaj tra kanaloj en Kopenhago. Aliaj, kiuj ne atingis la unuan ŝipon, ŝipveturis duonan horon poste. Post tio ni lunĉis je la 12-a

horo en la populara restoracio RizRaz.

Posttagmeze ni vizitis la muzeon de Thorvaldsen. Survoje al tiu muzeo, kiam ni haltis pro ruĝa lumo je stratangulo, ni vidis la danan reĝinon en aŭtoprocesio survoje al diservo en la katedralo de Nia Sinjorino (Vor Frue Kirke), en kiu oni memoris la murditajn norvegajn junulojn.




*En la muzeo de Thorvaldsen (fotis Sven)*

Post la muzeo de Thorvaldsen kelkaj LSG-anoj sekvis Wolfgang piedirante al preĝejo de Nia Savinto (Vor Frelsers kirke), kie oni povus iri eksteren ĉirkaŭ la turo. Mi ne partoprenis en tiu promenado, sed vizitis la muzeon "Kredu aŭ ne" kune kun germana LSG-ano.

La lasta punkto dum la ekskursa tago temis pri viziti gegejan kafejon Oscar Bar sur la Urbodoma Placo, (Rådhuspladsen), kie oni d/trinkis bieron aŭ limonadon. – Mi pensas ke ĉiuj estis kontentaj pri la aranĝo...

*Sven*

## LA GEJAJ ĜARDENAMANTOJ KAJ ILIA KLUBO

De 1997 ekzistas Gay Garden Club (GGC) en Nederlando. Jes, oni povas miri pri la angla nomo de la klubo, kaj en la komenco mi ankaŭ protestis kontraŭ tio, ĉar mi preferis nederlandan nomon kaj sugestis la nomon "de Homoveniers" (hovenier = ĝardenisto, kiu zorgas pri ĝardenoj). Sed vane.

La klubon iniciatis André Ancion, Amsterdamano, kiu nuntempe perlaboras parton de sia mono per la gvidado de turistoj tra amsterdamaj ĝardenoj. Hazarde en junio, kiam mi partoprenis ekskurson de GGC en Amsterdamo, ni renkontis lin dum la tagoj de malfermaj ĝardenoj en Amsterdamo.



La ideo de la klubo estas simpla. Viroj gejaj ŝatas esti kun aliaj viroj gejaj por paroli pri siaj ŝatokupoj, ĉi kaze la ĝardenumado. Ne ĉiam oni volas esti rigardata kiel peco da…

En la klubo estas kunordigantoj tutlandaj kaj provincaj kiuj organizas regule ekskursojn al belaj ĝardenoj en diversaj lokoj en Nederlando kaj eĉ eksterlande. Kelkfoje bicikle, sed ofte la sinjoroj uzas sian aŭtomobilon por la vizitado de ĝardenoj en iu regiono en sabato aŭ dimanĉo. Mi kelkfoje venas per trajno kaj faldbiciklo al la kunvenoj aŭ kunventuras kun amiko. Okazas eble 20 ekskursoj dum la jaro.

Kutime oni lunĉas komune kaj kelkfoje ankaŭ post la fino trinkas ankoraŭ iom aŭ eĉ kune verspermanĝas en iu restoracio. Almenaŭ unufoje jare estas dutaga ekskurso. Ĉi jare okazis dutaga ekskurso en suda provinco Limburgo. Sugestoj de la membroj estas bonvenaj. Kiam mi legis en ĵurnalo pri "follies" ("mistifikaĵoj") kiuj estas tipaj de la angla pejzaĝa ĝardenstilo, en diversaj ĝardenoj en Nord-Holanda Provinco, mi proponis ekskursi tien kaj … oni tuj akceptis, kondiĉe ke mi mem organizu la aferon.



Nu, feliĉe mi konservis la ĵurnalartikolon kaj tiel je la 3a de julio ni povis 10-ope viziti la ĝardenojn. Unu estis italstila, la alia estis la t.n. nederlanda Kremleno. Estis fascine aŭdi la rakontojn de la viroj kiuj komencis konstrui tiujn nun famajn ĝardenojn. Humuraj rakontoj. Komence la komunuma estraro tute ne ŝatis ke ili konstruis tiujn aferojn, sed imagu nun, la komunumo eĉ fieras pri la famo kiun ĝi ekhavis pro la konstruaĵoj en la ĝardenoj. Ni estis bone akceptitaj. Unu el la vizititaj ĝardenoj apartenis al gejaj viroj, kio estis agrabla surprizo por ni kompreneble… Kelkfoje ni ankaŭ speciale vizitas ĝardenojn de gejoj, kiel en la fino de aŭgusto, kiam ni vizitis orientan parton de Nederlando. La viroj estas jam membroj de nia klubo. Viroj ŝatas kompari … ankaŭ ĝardenojn, certe, ne nur la mezurojn de …

Do, ne estas mirige ke kelkfoje oni vizitis ankaŭ mian ĝardenon kiam ni faris biciklan ekskurson tra la florantaj bulbokampoj apudaj.

Sed ne necesas havi ĝardenon por esti membro. Ankaŭ balkono kun kelkaj plantoj sufiĉas… Nur devas esti la amo al floroj, plantoj, ĝardenoj kaj pejzaĝoj.

Unufoje jare okazas turista ĝardenvojaĝo eksterlande. Mi patroprenis jam vojaĝojn al Normandio, centra Francio (apud Bourges), Bundesgartenschau (en Schwerin, Germanio) kaj al suda Anglio. Ĉi jare mi ne kuniris, ĉar mi devis kanti kun mia koruso en tiu tempo, sed la grupo estis sufiĉe granda: 40 viroj kiuj vizitis la Mekon de la ĝardenarto, nome Anglion. Entute membras ĉ. 130 viroj.

Kompreneble la klubanoj inter si ankaŭ havas sufiĉe da kontaktoj , sed pri tio oni aŭdas nur de temp'al temp' ion. Ne per la retejo cetere (nuntempe la nura komunikilo, la gazeto malaperis pro la kostoj …). Se vi deziras iom rigardi la retejon, vi iru al: www.gaygardenclub.nl

*Bert*


## LA SITUACIO DE GEGEJOJ EN USONO

Mi estas usonano kaj vidas la landon de interne. Mi invitas la legantojn de FORUMO aldoni kion ili vidas de eksterne.

La situacio de gegejoj estas tre malsama laŭ niaj loĝlokoj. Estas partoj en mia lando, kie oni povas vivi sian vivon malferme. Mi loĝas en Fort Lauderdale kie gegejoj apartenas al la loka registaro. La ĵurnaloj raportas fiere pri gegejaj eventoj. Ili eĉ havas malferme gejajn raportistojn, kiuj regule skribas rubrikojn pri gegejaj temoj. En mia urbo ekzistas multaj gejaj organizaĵoj, ekzemple preĝejoj (kristanaj, budhistaj, islamaj, judaj), rodeoklubo kaj kluboj por multaj aliaj interesoj Ĝenerale en la regiono de sudorienta Florido ni vivas libere. La sama valoras por aliaj grandaj urboj de Usono. Sed, bedaŭrinde ekzistas multaj lokoj en Usono, kie oni ne povas vivi malferme, kie estus eĉ danĝere sciigi al la najbaroj ke oni estas gejo.

La plej fama kazo de murdo de gejo estis tiu de Matt Shepard, torturita li mortis ligita al palisaro en oktobro de 1998 en Wyoming. Iu protestanta sekto eĉ protestis dum la funebro de Matt kun portafiŝoj surskribitaj "Dio abomenas gejaĉulojn". Krimoj kontraŭ gegejoj kreskas en Usono, kvankam tio povas esti pro la fakto ke gejaj homoj ne plu malfieras kaj nun raportas tiajn krimojn kiel ili okazas.


La dekstra partio (Republikanoj) malferme kontraŭas homajn rajtojn por gegejoj. Sed la nuntempa prezidento Obama estas el la mezburĝa partio (Demokratanoj). Li deklaris ke sia registaro ne plu subtenos leĝojn kiuj malestimas la rajtojn edziĝi kaj edziniĝi por samseksaj paroj aŭ malpermesas al gegejuloj servi kiel soldatoj.



*Matthew Shepard (1976-1998) estis murdbatita, ĉar li estis gejo*

Ses subŝtatoj kaj la distrikto de Vaŝingtono permesas samseksan edzecon. Mia ŝtato ne. Tio signifas ke por protekti nin, mia edzo (ni edziĝis en Brazilo, sed oni ne respektas tion ĉitie) elspezis mil dolarojn al ĵuristo por skribi testamenton kaj kvar aliajn dokumentojn.

La republikanaj kandidatoj por la venonta prezidenta elekto ĉiuj kontraŭas gejajn rajtojn. Unu, Perry eĉ komparis esti geja kun esti alkoholmania. Kelkaj republikanaj politikistoj kiuj fervore kontraŭis gejajn rajtojn estis surprizitaj en "gejaj" situacioj. Roberto Arango de Portoriko forlasis sian postenon kiam oni malkovris fotojn de li nuda en la softvaro Grindr. Philip Hinkle metis anoncon en gejan retejon kaj pere de tio pagis $80 al vira ĉiesulo.




*Du viroj en hotel, unu el ili kun tiom dubinda moralo…*
*… kaj la alai estas ĉiesulo*

Larry Craig provis seksumi kun policano en flughavena necesejo. Ankaŭ kelkaj protestantaj viraj religiestroj estis surprizitaj seksumant kun aliaj viroj.

Aliflanke, laŭ raporto en *New York Times* kvazaŭ 60% de junaj republikanoj sub 30jaroj de aĝo akceptus samseksan edzecon. En aliaj grupoj de junaj usonanoj la elcento superas 60 %. Do ne sin demandas se iam ajn oni akceptos nin laŭleĝe, sin demandas nur - kiam.

*Robb*


LSG bezonas vin!

# PROGRESOJ EN LA SERĈO DE VAKCINILO KONTRAŬ AIDOSO

En Germanio ĉiujare aperas 3.000 mil novaj HIV-diagnozoj. Nova, de Hispanaj esploristoj evoluigita vakcino kontraŭ HIV pruvis en unuaj testoj 90%-an protektan efikon en homoj.

Por la studaĵo, la sciencistoj de la Hispana centro por bio-teknologio ekzamenis varianton de senfortigita pokso-viruso, en kies gena sinsekvo oni enigis kvar HIV-genojn. Dum testoj je homoj oni konstatis dum la unua jaro fortan imunreagan defendon Ĉ 90% de la testatuloj. Dum la dua jaro ja *ankoraŭ* ĉ 85%.

Jam en la jaro 2009 tajlandaj esploristoj povis proklami sukcesojn per simila preparĵo, tiam tamen kun malaltigon de la HIV-infektiĵa risko de nur 30% *longdaŭre*.



*D-ro Mariano Esteban*

Laŭ studaĵestro Mariano Esteban certe pasos longa tempo ankoraŭ, ĝis tia efikaĵo estos akirebla en apotekoj.

"Momente la efikaĵo pasas la testojn de fazo 1. Merkatotaŭga produkto dum la proksimaj jaroj ne estas supozebla, ĉar antaŭe la aliaj fazoj de studo ja devas sukcesi," eksplikis Esteban. Ekzemple, nur malmultaj libervoluloj partoprenas en la studaĵo, entute nur 30 HIV-negativaj personoj. En 24 de ili oni injektis la efikaĵon, en 6 nur placebo-produkton. Kromefikoj ne estis konstateblaj.

Similan eksperimenton Esteban ĵus ekas al HIV-positivaj testpersonoj, por *ankaŭ* inspekti eblan terapeŭtan efikon. "En ratoj per la vakzinado la HIV-viruso ne estis malhelpata invadi, sed ĝi restis kontrolebla", la esploristoj eksplikis.

**Vakcinilo kiel Sankta Gralo**

Esteban emfazas, ke vakcino unuarange estu dediĉata al riskogrupoj - ekzemple geamoristoj, gejaj viroj, infanoj de HIV-havinoj *aŭ* populacioj de Afrikaj landoj sude de la Saharo. "Nia vakcino celas la subtipon HIV-B, kiu disas en Eŭropo kaj Norda Ameriko. Por HIV-C en Afriko kaj Azio, la efikaĵon oni devas iomete varii", tion la esploristo. Foronte, la HIV-on oni tiam povos, rilate al siaj efikoj, kompari al herpeso, esperas Esteban.

Sciencistoj en la tuta mondo tamen avertas kontraŭ tro grandaj esperoj. "HIV-vakcinaĵo delonge estas por esploristoj la Sankta Gralo", deklaris Joseph Rahimian de la Langone Medical Center en New York. Aliflanke li "sentus inciton", se la resultoj de la Hispanaj esploristoj praviĝos. Per testoj oni nun antaŭ ĉio devus konstati, kiom longe la vakcinaĵo provizas la protektan efikon.

La rezultoj de la studaĵo estos publikigataj en la fakaj revuoj "Vaccine" kaj "Journal of Virology". (sept. 2011)

*Bernvardo*

# AŬSTRALIO ENKONDUKAS TRIAN SEKSON EN PASPORTOJ

Aŭstralio volas per tiu decido haltigi la diskriminacion pro la seksa identeco. En la aŭstralaj pasportoj de tuj nun ekzistas krom la vira aŭ la ina ankaŭ la sekso "X". Ĝi signifu "nedifinita" kaj faciligu la vivon de interseksaj homoj.




Samtempe transseksaj personoj ricevas la rajton enskribigi sian deziratan sekson. La socialdemokrata ministro por justico, Robert McClelland deklaris, ke transpersonoj nur devas montri rilatan afirmon de medicinisto, ke ili sentas sin viro resp. ino. Eĉ se, laŭ li, la leĝo nur koncernas malmultajn homojn, ĝi kontribuas al la fino de la diskriminacio pro seksa identeco. "Por la plej multaj homoj estas

tute normale, ĉiutempe povi vojaĝi sen timo pri diskriminacio", eksplikis Mc McClelland. "Tiu nova regulo disponigos tiujn liberojn al pli da homoj."

Organizaĵoj de transseksaj personoj laŭdis la decidon de la registaro. "Tio estas surprize positiva afero", deklaris Peter Hyndal de la grupo 'A Gender-Agenda'. "Tio estas la plej granda reformo por transseksaj homoj, kiun iam ajn entreprenis ĉi lando - “ vera grandiozo!"

**Liberecigo en multaj landoj**

En pluraj okcidentaj landoj okazis dum la lastaj jaroj liberecigo de la leĝoj por trans-personoj. Tiel ekde la lasta jaro, en Usono povas koncernaj personoj jam antaŭ ĝustigo de siaj seksoj per operacio povas ŝanĝigi sian sekson en la pasporto. Per tio ilia sekso indikata en la dokumentoj akordiĝu kun ilia ekstera apero.


Multaj antaŭoperaciaj trans-personoj vivas multajn jarojn en sia preferata sekso, antaŭ ol ili entreprenas multekostan kaj parte danĝeran ĝustigon de sia sekso. Se ilia ekstera sekso ne akordas kun la enskribaĵo en la pasporto, tio kaŭzas en multaj landoj - aparte en la araba mondo - je la eniro parte gravajn fimalhelpojn, eĉ ĝis la malpermeso eniri. (okt. 2011)

*Bernvardo*

# NENIUJ ESCEPTOJ POR FUNDAMENTALISTOJ

Eŭropaj juĝistoj: Instruado pri seksualeco estas devo!

Gepatroj ne rajtas liberigi siajn infanojn de la instruado pri seksualeco, tion decidis la Eŭropa Juĝkortumo pri Homrajtoj en Strasburgo, Francio.



Akuzantoj estis kvin edzparoj el Salzkotten (Germanio), kiuj apartenas al baptista libera eklezio. Ili volis teni siajn infanojn for de la instruado pri seksualeco, ĉar ili taksis pornografian kaj malkristanan la instrulibron. Aparte ili kritikis, ke en ĝi ne nur la malgeja edzeco estas montrata kiel ebla formo de kunvivado. Krome ili volis preventi la partoprenon de siaj infanoj en la teatra projekto "Mian korpon posedas mi". La projekto celis sensivigi la infanojn por la temo de seksa misutiligo per nekonatoj aŭ familianoj

Unuafoje en 2005 la gepatroj volis siajn infanojn, tiam kvaraklasanoj, liberigi de la instruado pri seksualeco. Germanaj juĝkortumoj ĉiam konfirmis la konvinkon de la lernejo, ke la instruado estas devo

por ĉiuj. En 2009 ilia akuzo antaŭ la Germana Federacia Juĝkortumo pri la Konstitucio ankaŭ fiaskis. Ĉar la gepatroj plurfoje ne pretis pagi monpunojn pro neplenumo de la lerneja devo (en Germanio ĉiu infano nepre devas viziti lernejon), ili ricevis punojn je malliberejo de ĝis 43 tagoj.

**Akuzo "evidente senprava"**

La Eŭropa Juĝkortumo pri Homrajtoj nun repelis la akuzon kiel evidente senprava. La Germana lerneja devo havas, tiel deklaris la Strasburgaj juĝistoj, la taskon ensociigi infanojn kaj preventi paralelajn subsociojn. La landoj de la Germana federacio havas, laŭ ili, la rajton instrui al la infanoj "necesajn sciojn", por ke tiuj povas evoluigi siajn proprajn moralajn konvinkojn. Per la Interkonsento pri Homrajtoj, gepatroj ne estas protektataj kontraŭ tio, ke iliaj infanoj estas konfrontataj al alies konvinkoj.


En la federaciaj landoj ĉiam denove aperas diskutoj pri la instruado pri seksualeco, inter alie, ĉu oni en tiu kadro pritraktu la samseksemon. Laŭ esploro de la Federacio Centro por Prisaneca Klerigo, malpli ol la duono de ĉiuj lernantoj estas klerigataj pri samseksemo dum la instruado pri seksualeco. (sept. 2011) *Bernvardo*

## "GEJA EDZIĜO MINACAS HOMARON"

Joseph Ratzinger, pli vasta konata kiel papo Benedikto 16a, deklaris antaŭ 180 diplomatoj, ke permisi al gejaj paroj la samajn rajtojn kiel al malsamseksaj paroj povus minaci la estontecon de la homaro.

La fraŭla papo eksplikis krome: "Malgeja edziĝo ne estas nura social konvencio, sed la fundamenta kern de ajna socio. Sekve politiko, kiu subfosas la familion, minacas homan dignecon kaj la estontecon de la homaro."

Daŭrigis la homofobo sur la la seĝo de Petro: "La familia unuo estas fundamenta kaj por la eduka procezo kaj por la evoluigo de individuoj kaj ŝtato, sekve bezonatas politico, kio promocias famlion kaj helpas socian koheron kaj dialogon."




*La ulo asertas: Geja edziĝo minacas la sanktecon de tradicia edziĝon. La sago indikas la kvoton de eksedziĝoj.*

La samajn absurdaĵojn ripetis la iama aŭstrala stelulino de teniso Margaret Court, kiu nun estas pastorino en fundamentista Victory Life Center de Perth (Aŭstralio) Laŭ ŝi la legaliĝo de samseksaj partnerecoj signifus "promocion de malnaturaj kaj malsanaj kunligoj". Pro tiuj eldiroj ŝi rikoltis protestoj de Martina Navratilova kaj Billie Jean King, ambaŭ malfermaj lesboj. Court replikis al ili: "Dio amas

vin, sed malĝusteco ne povas fariĝi ĝusteco. Ne klopodu ŝanĝi min. Fakte mi ne estas kontraŭ samseksamantoj, sed tio estas la vortoj de la Biblio."

Cetere la fundamentalistoj traktas la Biblion kiel memserva butiko, ĉar ankaŭ tio estas vorto de la Biblio: "Sed mi ne permesas al virino instruadi, nek regi super viro, *sed esti en kvieteco." (1a epistolo al Timoteo*).

*Wolfgang*

## DEKMILOJ DA SEKSPERFORTITOJ FARE DE KATOLIKAJ EKLEZIULOJ

En diversaj landoj malfermiĝis la historiaj restaĵoj de sekperfortaĵoj fare de katolikaj ekleziuloj. En Nederlando en decembro 2011, raporto estas publikigita de la t.n. komisiono Deetman (eksministro, protestanto) kiu esploris ĝis kia grado okazis seksperfortaĵoj en Nederlando en la pasintaj 50 jaroj.

La raporto mencias inter 10 kaj 20 mil seksperfortitoj dum tiu periodo (granda necerteco do, ĉar ne ĉiuj volas paroli pri tio).




*La Vatikano ne ŝatis la kampanjon de Benetton lontraŭ malhato.*

Multaj viroj en sia posta vivo havis ekleziuloj en la junaĝo. Ofte la viktimoj problemojn pro la seksperforto fare de silentis pro tio, ĉar ili hontis por siaj

parencoj. Kelkfoje tamen la misagoj fariĝis publikaj. Sed anstataŭ ke la altaj respondeculoj en la eklezio punis tiujn homojn, oni ofte sendis ilin aliloken – kie ili daŭrigis siajn misagojn. Oficiale la antaŭa ĉefepiskopo de Utreĥto diris ke "li ne sciis pri tio" (eĉ en la germana, kiu estas jam esprimo kun malbona rememo-raĵo..). Sed el la dokumentoj de la esplorkomisiono montriĝas ke altranguloj sciis pri tio, sed vole ne vole silentis pri la krima konduto de siaj subuloj.

Dum televida elsendo en decembro, la nu-na ĉefepiskopo povis esprimi nur sian be-daŭron pri tio kio okazis al tiom da junu-loj fare de pedofilaj ekleziuloj. Poste, dum la dimanĉa meso, en la eklezioj oni laŭtlegis leteron de la ĉefepiskopo pri la seksperfortaĵoj kaj la reago de la episkopoj.

Ĉar la plimulto de la seksperfortaĵoj okazis antaŭ pli ol dudek jaroj, laŭ la leĝo la krimoj estas ne plu puneblaj. Tamen aŭdiĝas voĉoj de homoj kiuj volas provi procesi kontraŭ la eklezio pro la seks-perfortaĵoj faritaj antaŭ longe. Ili esperas ankaŭ je rehonorigo aŭ kompensopago.

Certe oni bezonas psikologian klarigon por tio kial tiom da junuloj dum tiom da tempo silentis pri tio kio okazis al ili. Kelkiuj diras ke la deviga celibato de la katolika eklezio estas la kaŭzo de la misfaraĵoj. Sed aliaj opinias ke tio ne povas esti la nura klarigo. Estis iu etoso kiu ebligis tian senbremsan konduton de hierarkie pli altrangaj figuroj.




Estas konate ke inter la katolika ekleziul-aro troviĝas ankaŭ pli granda procentaĵo de gejoj. Nuntempe ili pli libere povas esprimi sin sen esti tuj kondamnitaj al la infero, sed tamen ilia amo estas konside-rata malinda. Verŝajne la pli granda pro-centaĵo de gejoj rilatas al la fakto ke estante juna gejo en eklezia instituto, oni ne bezonis defendi sin kontraŭ malagra-blaj rimarkoj se oni restas senedzina, ĉar oni ja estas en eklezio kiu malpermesas oficiale la edziĝon de siaj ekleziuloj. Cetere estis kutimo ke almenaŭ en grandaj katolikaj familioj, unu el la filoj aŭ filinoj eniras religian instituton.

Ĉiukaze, necesas purigi la stalon de Romo, sed kiu papo vere komencos tiun laboron kaj forigos la kaŭzojn de la perfortado?

*Bert*

## NEPALO MALFERMAS LA PORDOJN

De 2008 Nepalo ne plu havas reĝon; la

lando inter Tibeto kaj Bharato estas nun respubliko kaj post longaj perturboj klopodas difini sin mem. Ankoraŭ mankas konstitucio, kio ja estus la fundamento por la estonta formo de la ŝtato. La politikistoj – ofte kontraste al la opinio de la loĝantaro – ja estas optimistaj, ke ili finfine sukcesas fini la laboron. Dume la estonteco de la estas nedefinita.

En 2008 la suprera kortumo ordonis, ke la registaro enkonduku leĝon por legaliĝi samseksan edziĝon, sed la politikistoj ankoraŭ ne faris tian leĝon. Male, nun eĉ estas propono de la ministerio laŭ kio samsekso denove fariĝus krimo "kontraŭ la naturo" kaj edziĝo sekvo estus nur viro kaj virino. La propono do ne respektus la decidon de la supera kortumo.



*Geja fiereco en la nepala ĉefurbo Katmando*

Dume la LGBT-komunumo aktive kontribuas al la difino de rajtoj de ĉiuj en laika ŝtato, spite al ĉiutagaj diskriminacioj.

Ekzemple por la popolnombrado en 2011 Nepalo enkondukis – kiel unua lando en la mondo! – la trian genron, sed dume la Centra Statistika Buroo ne inkluzivis ĝin en la provizora raporto.

Aktivuloj en Nepalo klopodas fari la landon alloga por gegejoj. La logiko estas, ke kutimaj dorsosako-turistoj ne uzas tro da mono, dum pli riĉaj gejaj turistoj uzus pli da mono en la lando. Gejoj povus edziĝi proksime al Monto Everesto kaj poste "safarii" sur elefanta dorso. Nepalo nun tamen ne edziĝas alilandanojn, la ceremonio do havus nur simbolan valoron por ne-nepaloj. Edziĝa ceremonio fare de hinduistaj pastoroj tamen estas ĝenerale alceptataj ene de la lando.

La unua tia ceremonio en 2010 estis organizita de la landa lgbt-organizaĵo "Blua Diamanto" kaj ties plej konata aktivulo, parlamentano, Sunil Pant. Li klarigis la situacion al la hinduista pastro, kiu faris ĝin laŭ propraj religiaj ritoj. Tiam edziĝis brita civitano sian bharatan musliman partneron. La paro ankaŭ ricevis oficialan permesilon.

La pastro klarigis, ke ja estas edziĝo de geja paro, sed ĉar la partneroj estas de malsamaj religioj, ili ankaŭ povintus elekti la *miteri*-ceremonio. Ene de nepala hinduismo estas tiu ceremonio, per kiuj du individuoj de la sama genro povas kunligi unu la alian kaj post kiu ili estas konsiderataj kiel anoj de la sama familio.

Alia grava evento okazis en 2011, la unua lesba edziĝo okazis en la Dakŝinkali templo sude de la ĉefurbo Katmando – probable la unua lesba edziĝo en Azio.

Courtney Mitchell (41) kaj Sarah Welton (48), ambaŭ el Denver (Usono).



*La unua lesba edziĝo en Nepalo*

Courtney instruas historian kaj antaŭe laboris en Nepalo kiel volontulo. Por ŝi estis grava, ke la edziĝo okazu la la 28an de junio – la tago, kiam komencis la tumultoj en Stonewall, Novjorko. Tiam estis turniga punkto por la geja movado. Per tiu dato ŝi volis signali al la nepala movado, ke ili estas parto de pli granda komunumo.

Welton, ŝia partnerino, estas advokato. Ilia hejmŝtato, Kolorado, ne permesas samsseksedziĝon. Ĉar ili ankaŭ ricevis oficialan edzĝ-permesilon, ili volas batali, por oficiala agnosko de ilia edziĝo en Usono.

Nepalo estas unu el la plej malriĉaj landoj de Azio. Neniu scias, kiun vojon Nepalon elektas,  sed jam nun Nepalo demonstris, ke malriĉeco ne necesas iras kune kune malprogreso.

*W*

## POLLANDO BALOTIS

En la parlamentaj balotoj kiuj okazis la 9-an de oktobro en Pollando la unuan fojon estis elektita kiel parlamentano malferma samseksemulo, Robert Biedroń - fondinto kaj eksa prezidanto de la asocio Kampanjo Kontraŭ Gejfobio. Krome, oni elektis ankaŭ Anna Grodzka, kiu estas la tria transseksa persono en la mondo elektita kiel parlamentano (nuntempe la ununura!).



Ambaŭ kandidatiĝis de la balotlistoj de la nova politika partio Movado de Palikot, fondita de la skandalema Janusz Palikot, kiu estis deputito de la reganta modera Civitana Platformo, sed antaŭ unu jaro eksiĝis kaj fondis la propran partion. En la balotoj li venigis en la 460-seĝan parlamenton 40-personan grupon da deputitoj kaj lia partio neatendite fariĝis la tria forto en la pola politiko. En la programo de Movado troviĝas i.a. enkonduko de la registrita partnereco.

*Pawel*

## DANĜERAS ESTI GEJO EN IRANO

Aktivuloj por homaj rajtoj raportis, ke en septembro 2011 la fundamentista reĝimo de Irano pendumis tri viroj pro samseksan amoron. Ili estis "M. T.", "T.T." kaj "M. Ch.", ilia aĝo ne estis indikita.

Ili estis kondamnitaj surbaze de paragrafo 108 kaj 110 de la krima kodekso: la puno por sodmio estas mortigo kaj ŝaria-juĝo

elektas la murdigmanieron.

Kutime la reĝimo en Irano aldonas aliajn pretekstojn, ekz-e perforigo, sed en tiu kazoo nenio estis menciita, do ili estis pendumitaj nur pro seksumi kun alia viro.

Homofobio estas la oficiala politico de Irano.



En januaro 2011 la reĝimo ŝtonumis du virojn, Ajub (20) kaj Mosleh (21), kiu, laŭdire, per poŝtelefono filmis seksumadon kun 17 jaraĝa junulo.

La raporto asertas, ke la junulo denuncis la pli aĝajn virojn al la religia polico. Oni diris, ke la filmeto krome inkluzivis prezidanton Ahmadineĵad kaj la religion gvidanton Khamenei, kies kapoj estis montitaj sur la kapoj de azenoj.

La verdikto estis tuj ekzekutita. La leĝo specifas, ke la ŝtonoj nek estu tiom grandaj, ke ili kaŭzas tujan mortigon, nek tiom malgrandaj, ke ili ne povas esti konsideritaj kiel ŝtonoj.

Kelkaj teologoj de Ŝia-muslimo kontraŭas ŝtonumadon. La espero estas, ke iam estas religia ekspertizo (aŭ fatwa), kiu malpermesas tiun praktikon. Laŭ ili nenio en la Korano praktikas tiun agon.---

Kaj ĉio ĉi okazas antaŭ rekte antaŭ niaj okuloj … ŝtonumoj, pendumoj, ĉio tuj videbla en la reto, elŝutebla de *youtube* kaj kio okazas … la mondo rigardas kaj silentas

*Wolfgang*

# MORTRIS AXEL AXGIL

Sabate je la sesa matene la 29-an de oktobro forpasis Axel Axgil 96 jara. Li naskiĝis kiel Axel Lundahl-Madsen la 3-an de aprilo 1915 en Odense.

En la jaro 1948 li fondis la danan gejan asocion "Forbundet af 1948" (Unuiĝo de 1948),kies nomo estis origine "Kredsen af 1948" (Cerklo de 1948). Ĝi fariĝis poste LBL, la Landorganizo por gejoj kaj lesboj, (Landsforeningen for Bøsser og Lesbiske), la nuntempan ”LGBT-Danmark”.

Jam en 1950 li ekkonis sian dumvivan partneron Eigil Eskildsen kaj ili – kiel la unua paro en la mondo – ”geedziĝis” (registrita parnereco) la 1-an de oktobro 1989 en la urbodomo en Kopenhago, kun la familia nomo Axgil (Axel, Eigil). Ili nomis sin Axgil multe pli frue. Eigil mortis en 1995.

En la jaro 1949 Axel kaj Helmer Foged-gaard (1907 – 2002) fondis la membrore-vuon ”La amiko” (Vennen) kun Foged-gaard kiel redaktoro. En la jaro 1950 je la unua ĝenerala kunveno de la geja asocio, ”Forbundet af 1948” oni elektis Axel Axgil kiel la unuan prezidanton.

Axel kaj Eigil Axgil havis kioskon/-butikon kie ili vendis gejerotikajn bildojn kaj librojn kun nudaj viroj ”Male Models”. Pro manko da spaco ili poste aĉetis lernejon – kiun oni ne plu uzis – Axelhus (hus = domo) en la kamparo

meze en Selando (Sjælland) inter Køge kaj Ringsted. Tie ili daŭrigis sian vendadon de gejerotikaj bildoj kaj libroj. Sed iom post iom ili ŝanĝis la okupon de gejerotika materialo kaj uzis la domon kiel pensionon. La loko havis naĝbasenon en la ĝardeno kaj saŭno en la domo. Multaj danaj kaj eksterlandaj precipe germanoj, norveganoj kaj svedoj feriis en Axelhus, en tiu liberaleca loko.



Kune kun mia kaj lia iama bona amiko Helmer Fogedgaard, li verkis la libron Gejaj bataljaroj (Homofile kampår) kun subtitolo: Gejvivo tra la tempoj (Bøsseliv gennem tiderne) eldonejo: Grafolio Rudkøbing en 1985.

Dum "World Outgames 2009" en Kopenhago Axel prelegis ĉe la konferenco de homa rajto.

Kune kun tri aliaj gejoj en la jaro 2007 Axel Axgil fondis la gegejan tombon "La ĉielarko" (Regnbuen) en la tombejo "Assistents Kirkegaard" en Kopenhago, kie li entombiĝis la 26-an de novembro 2011. La nuna prezidanto de LGBT-Danmark, Vivi Jelstrup sinkis la urnon en la teron.

Axel havis imponan memoron kaj li kapablis rakonti interesajn okazintaĵojn de sia vivo dum horoj. Mi konis Axel dum la lastaj dek jaroj. Kiam mi vizitis lin – li, kiel 96 jara – preparis vespermanĝaĵon por mi. Kvankam mi vizitis lin ofte, li sendis al mi stakon da leteroj. Li ankaŭ posedis komputilon kaj ni interrete korespondadis.

Honoron al lia memoro.

*Sven*

## RIFUZOFICISTO – NEDER-VORTO DE LA JARO 2011

La nederlanda lingva fondaĵo kiu eldonas la gazeton "Onze Taal" elektas ĉiujare novan vorton kiu faris karieron en la daŭro de la jaro. Por 2011 la asocio elektis la vorton "rifuzoficisto". Rifuzoficisto estas oficisto kiu pro sia konscienco ne volas oficiale edzigi gejojn aŭ edzinigi lesbojn. Temas pri malgranda procentaĵo de la oficistoj kiuj havas ofte ortodoks-kalvinisman religion. En la registara inter-konsento de la nuna nederlanda registaro, kiu konsistas el kristandemokratoj kaj konservativaj liberaluloj, kun apogo de populisma partio islamofoba, la ebleco restis por oficistoj en komunumoj rifuzi edzigi gejojn aŭ edzinigi lesbojn. Tio estis netolerebla laŭ gejaj aktivuloj, ĉar oficisto devas obei la leĝon kiu diras ke gejoj kaj lesboj rajtas oficiale edz(in)iĝi. Estis diskutoj pri tio ĉu rifuzoficistoj rajtus plu deĵori en la fako de oficiala nupta ceremonio.




*Ĉu vi deziras pli da kafo?*

*Ne, mi rifuzas!*

En la parlamento, Dua Ĉambro, Tofik Bibi, membro de la Verda Maldekstro kaj liberpensa islamano, decidis prepari proponon pri la neeblo ke oficisto de komunumo rajtas rifuzi ke li/ŝi edz(in)igu gejojn aŭ lesbojn. Ĉar la populisma partio de Wilders antaŭe faris multe da bruo pri gejoj kiuj fuĝis de sia loĝejo pro daŭra ĝenado kaj malbontraktado fare de marokaj junuloj – sed ne pro samaj agoj de autoĥtonoj gejofobiaj – Tofik Bibi prezentis sian proponon en la parlamento, tiel devigante la populistojn preni pozicion. Tiuj ne povis ne akcepti la proponon, tiel ke per helpo de la maldekstraj opoziciaj partioj kun la populisma partio la propono estas akceptita. Tio signifas ke en la venonta tempo ne plu eblas kiel komunuma oficisto mem decidi kiuj(n) jes aŭ ne oficiale edz(in)igi. En la Unua Ĉambro de la Parlamento, la registaro ankaŭ dependas de la subteno de ortodokskalvinisma partio, sed nun post la decido de la Dua Ĉambro, verŝajne ne estos problemo efektivigi la decidon. Tio signifas ke la vorto de la jaro 2011 baldaŭ estos nur historiaĵo.

*Bert*


**KOLOFONO:**
**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

**interretejo:** http://lsg-esperanto.org
**membriĝo:** ĉe la sekretario
**kotizoj:** 12 € por 1 jaro / 30 € por 3 jaroj
300 € por dumviva membreco

**Prezidanto:** Randy Dean [laprezidanto@gmx.net]

**Sekretario kaj Kasisto:** [lasekretario@gmx.net]
[lakasisto@gmx.net]
Rolf Köhler, Bergstr. 78
DE - 01069 Dresden, Germanio
**Redaktanto:** vakas
**Estrarano por varbado:** Sebastian Kirf [kirf@gmx.de]
**Kromaj Estraranoj:**
Arnold Victor [arvimide@earthlink.net]
Harry Barron [phsb@orange.net]
Francis Soghomonian [fsoghomonian@yahoo.fr]

**Sendu abunde kontribuojn por via membrofolio FORUMO antaŭ la 1a de marto 2012 al:**
**[laredaktanto@gmx.net]**
**aŭ al la helikpoŝta adreso de la sekretario.**

***Nepre ne kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono ne estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio***

**Limdato por FORUMO 147: 2012-03-01**